

107 128
99

Litteratura aldona de
Lingvo internacia n° 8
1907

KAROT-HARULO

de J. Renard

trad. H. Muffang

BIBLIOTECA FASCEI
SARTORIO GENOVA
ESPERANTO

KAROT-HARULO

Fragmentoj

ANTAŬPAROLO DE L' TRADUKINTO

Karotharulo ne estas pli malbona, pli malobeema aŭ pli malvirtema, ol iu ajn alia knabo. Eĉ li estas bonkora kaj amema. Sed li havas ruĝajn harojn, malbelan vizaĝon kaj estas la laste naskita el tri infanoj: unuvorte li naskiĝis sub malfavora stelo. Tial lia patrino al li trudas la plej malagrablajn taskojn, dum liaj gefratoj ricevas ĉiujn favorojn kaj karesojn; severege punas liajn malplej gravajn kulpojn, dum la gefratoj ĝuas plenan nepuneblecon. Sekve la malfeliĉa Karotharulo fariĝas ĉiutage pli malĝoja, pli timema, pli kruela, tiel ke fine, ian tagon, li bedaŭras, ke « ĉiu ajn ne povas esti orfa ».

Pligrandigante en tiuj ĉi bildetoj la ofte nevolan nekompremon, maljustecon, partiecon de iaj gepatroj por iu aŭ alia el siaj infanoj, J. Renard sendube volis, ke ni ŝatu, serĉadu kaj uzadu en la familia vivo kompaton, bonvolemon, justecon por ĉiuj, kaj precipe por tiuj, kiujn Naturo malpli favoris ĉu korpe, ĉu spirite. Amo kaj justeco naskas amon kaj justecon.

J. Renard naskiĝis en 1865. *Poil de Carotte* estas la plej konata el liaj multaj verkoj. Lia stilo estas tute klasika kaj pure franca. La ŝajna maldoĉeco de la penso kovras sinceran amon por la homaro kaj la infanaro.

H. MUFFANG.

La kokinoj.

— Mi vetas, diras S-rino Lepic (1), ke Honoro ankoraŭ forgesis fermi la kokinejon.

Estas vere. Oni povas pri tio certiĝi, rigardante tra la fenestro. Tie, tute ekstreme de la granda korto, la kokineja tegmento montras, en la nokto, la nigran kvadraton de sia nefermita pordo.

— Felikso, se vi irus ĝin fermi ? diras S-rino Lepic al la plej aĝa el siaj tri infanoj.

— Mi ne estas tie ĉi por zorgi pri la kokinoj, diras Felikso, knabo pala, malfervora kaj timema.

— Kaj vi, Ernestino ?

— Oh ! mi, panjo, mi tro timus !

Granda frato Felikso kaj fratino Ernestino apenaŭ levas la kapon por respondi. Ili legas, tre interesataj, apogante la kubutojn sur la tablon, preskaŭ frunto ĉe frunto.

— Dio, kiom stulta mi estas ! diras S-rino Lepic. Mi forgesis. Karotharulo, iru fermi la kokinejon !

Ŝi donas tiun aman nometon al sia lastenaskito, ĉar li havas flavruĝajn harojn kaj makulŝutitan haŭton. Karotharulo, kiu ludas *je nenio*, sub la tablo, stariĝas kaj timeme diras :

— Sed, panjo, ankaŭ mi, mi timas.

— Kiel ? respondas S-rino Lepic, tia granda knabo, kia vi estas ! Estus ridinde. Rapidu, mi petas !

(1) Elp. Lepik.

— Oni konas lin ; li estas kuraĝa, kiel kaproviro, diras fratino Ernestino.

— Li timas nenion kaj neniun, diras Felikso, la granda frato.

Tiuj komplimentoj fierigas Karotharulon, kaj, hontante, ke li ilin ne meritas, li jam batalas kontraŭ sia timemo. Por lin kuraĝigi definitive, lia patrino promesas al li vangofrapon.

— Almenaŭ, lumigu al mi, li diras.

S-rino Lepic levas la ŝultrojn, Felikso malŝate ridetas. Nur Ernestino, kompatema, prenas kandelon kaj akompanas la frateton ĝis la fino de l'koridoro.

— Mi atendos vin tie ĉi, ŝi diras.

Sed ŝi tuj forkuras, timigite, ĉar forta ekblovo de vento ŝancelas la lumon kaj ĝin estingas.

Karotharulo ektemas en la mallumo. Ĝi estas tiel densa, ke li kredas sin blinda. Ifoje, ventblovo lin envolvas, kvazaŭ glacia litotuko, por lin forporti. Ĉu vulpoj, eĉ lupoj, ne blovas al li tra la fingroj, sur la vangon ? Plej bone estas rapidi trafemaltrafe al la kokinejo, kun la kapo antaŭe por trabori la mallumon. Palpetante, li ekkaptas la hoketon de la pordo. Je la bruo de liaj paŝoj, la kokinoj, timigite, ektumultas, bleketante sur sia stango. Karotharulo krias al ili :

— Silentu do, ĝi estas mi !

Li fermas la pordon, kaj forkuras, kvazaŭ li havusflugilojn je la kruroj kaj je la brakoj. Kiam li reeniras, spiregante, fiera pri si, en la lumon kaj la varmon, ŝajnas al li, kvazaŭ li prenis novan kaj malpezan veston anstataŭ kotaj kaj pluvaj ĉifonaĵoj. Li ridetas, rekte staras en sia fiereco,

atendas gratulojn, kaj nun, ekster danĝero, serĉas sur la vizaĝo de siaj gepatroj signon de ilia ĵusa maltrankviliĝo.

Sed frato Felikso kaj fratino Ernestino trankvile daŭrigas sian legadon, kaj S-rino Lepic al li diras per natura voĉo :

— Karotharulo, vi nun iros ĝin fermi ĉiuvespere.

La kunikloj.

— Ne plu restas por vi melono, diras S-ino Lepic; cetere, vi estas kiel mi, vi ne ŝatas melonon.

— Kiel bone troviĝas! diras al si Karotharulo. Oni tiel trudas al li siajn ŝatojn kaj malŝatojn. Principe li devas ami nur tion, kion amas lia patrino. Kiam oni alportas fromaĝon :

— Mi estas tute certa, diras S-ino Lepic, ke Karotharulo ne manĝos fromaĝon.

Kaj Karotharulo pensas :

— Ĉar ŝi estas certa, ne utile estas provi.

Plie, li scias, ke tio estus danĝera.

Cetere, ĉu li ne havas tempon por plenumi siajn plej strangajn kapricojn en lokoj konataj nur de li? Je la deserto, S-ino Lepic diras al li :

— Iru porti tiujn ĉi tranĉaĵojn de melono al viaj kunikloj.

Karotharulo plenumas la komision malrapide, tenante la teleron tute horizontale por elverŝi nenion.

Je lia eniro sub ilian tegmenton, la kunikloj, klinante oreton, levante supren sian nazon, streĉ-

ante la antaŭajn piedojn, kvazaŭ ili estus tuj ludontaj tamburon, rapidas al li.

— Oh! Atendu, diras Karothulo; momenteton, mi petas, ni dividu inter ni.

Sidiĝinte unue sur amason da koto, da senecio mordetita ĝis la radikoj, da brasikaj trunketoj, da malnovaj folioj, li donas al ili grajnoj de melono kaj trinkas mem la sukon: ĝi estas dolĉa, kiel nova vino.

Poste, li skrapas per siaj dentoj tion, kion lia familio lasis je la tranĉaĵoj da sukera flavaĵo, ĉion, kio ankoraŭ estas fluidigebla, kaj li transdonas la verdaĵon al la kunikloj ronde sidantaj sur ilia postaĵo.

La pordo de la tegmenteto estas fermita.

La suno invitanta dormeti enŝoviĝas tra la truoj de la tegmentaj tegoloj kaj trempas la pinton de siaj radioj en la mallumon malvarmetan.

La pikfosilo.

Frato Felikso kaj Karotharulo laboras kune. Ĉiu havas sian pikfosilon. Tiu de frato Felikso estas fabrikita laŭmezure, ĉe la hufforgisto, el fero. Karotharulo fabrikis la sian mem, el ligno. Ili ĝardenas, laboregas kaj konkuras je fervoro. Subite, en la momento, kiam li tion malplej antaŭvidas, (ĉiam en tiaj momentoj okazas malfeliĉaĵoj), Karotharulo ricevas baton de pikfosilo meze en la frunto.

Baldaŭ poste oni devas transporti, kuŝigi zorge sur la liton fraton Felikson, kiu svenis, vidante la

sangon de l'frateto. La tuta familio ĉeestas, staras sur la pinto de l'piedoj, kaj time ekĝemas.

— Kie estas la malsvenigaj saloj ?

— Iom da freŝa akvo, mi petas, por akvumi la tempiojn.

Karotharulo supreniras sur seĝon por vidi super la ŝultroj, inter la kapoj. Lia frunto estas bandaĝita per tolaĵo jam ruĝa, kie la sango ensorbiĝas en larĝan makulon.

S-ro Lepic al li diris :

— Vi belete estas trafita !

Kaj fratino Ernestino, kiu bandaĝis la vundon :

— Enbatiĝis, kiel en buteron !

Li ne kriis, ĉar oni rimarkigis lin, ke tio tute ne helpas.

Sed jen frato Felikso malfermas unu okulon, poste la alian. Krom timo estos nenio, kaj ĉar lia vizaĝkoloro grade reaperas, la maltrankviliĝo, la timego el ĉiuj koroj eliĝas.

— Ĉiam do tia sama ! diras S-rino Lepic al Karotharulo; ĉu vi ne povis vin gardi, stultuleto !

La karabeno.

Sinjoro Lepic diras al siaj filoj :

— Sufiĉas unu karabeno por vi ambaŭ. Fratoj, sin reciproke amantaj, havas ĉion komune.

— Jes, paĉjo, respondas granda frato Felikso, ni laŭvice uzos la karabenon. Kaj eĉ sufiĉos, se Karotharulo pruntedonos ĝin al mi de tempo al tempo.

Karotharulo diras nek jes, nek ne, li malfidas.

Sinjoro Lepic tiras el la verda ingo la karabenon kaj demandas :

— Kiu el ambaŭ ĝin portos unue ! Ŝajnas, ke la unuanaskito.

GRANDA FRATO FELIKSO

Mi lasas la honoron al Karotharulo. Li komencu !

SINJORO LEPIC

Felikso, vi agas ĝentile hodiaŭ. Mi tion memoros.

Sinjoro Lepic metas la karabenon sur la ŝultron de Karotharulo.

SINJORO LEPIC

Iru, infanoj ; amuziĝu, ne disputante.

KAROTHARULO

Ĉu ni prenos kun ni la hundon ?

SINJORO LEPIC

— Neutile. Vi estos la hundo, ĉiu viavice. Cetero, tiaj ĉasistoj, kiel vi, ne vundas, ili tuj mortigas.

Karotharulo kaj granda frato Felikso foriras. Ilia simpla kostumo estas la ĉiutaga. Ili bedaŭras, ke ili ne havas botojn, sed Sinjoro Lepic ofte diras, ke vera ĉasisto ilin malŝatas. La pantalono de vera ĉasisto treniĝas sur liaj kalkanumoj. Li neniam ĝin refaldas. Li tiel marŝas tra la koto, tra la plugitaj kampoj, kaj baldaŭ botoj formiĝas, altiĝas ĝis la genuoj, firmaj, naturaj, kiujn la servistino, laŭ ordono, ne devas forigi.

— Mi esperas, ke vi ne revenos, nenion mortiginte, diras granda frato Felikso.

— Mi esperas, diras Karotharulo.

Li sentas jukon je la ŝultro, kaj ne volas almeti sian pafilon.

— Ĉu ne ? diras granda frato Felikso, mi lasas vin porti ĝin tute satege ?

— Vi estas mia frato, diras Karotharulo.

Kiam ia bando da paseroj forflugas, li haltas kaj signas al frato Felikso, ke li ne plu moviĝu. La bando flugas de branĉbarilo al alia. Kurbigante la dorson, la du ĉasistoj alproksimiĝas senbrue, kvazaŭ la paseroj dormus. La bando ne restas, kaj pepante aliloken forflugas. La du ĉasistoj restariĝas ; granda frato Felikso ĵetas insultojn. Karotharulo, kvankam lia koro batas, ŝajnas malpli senpacienca. Li timas por la momento, kiam li devos pruvi sian lertecon.

Se li maltrafus ! Ĉiu prokrasto al li faciligas la koron.

Nu, tiun ĉi fojon, la paseroj ŝajnas lin atendi.

GRANDA FRATO FELIKSO

Ne pafu, vi estas tro malproksime.

KAROTHARULO

Ĉu vi kredas ?

GRANDA FRATO FELIKSO

Certe ! Tio erarigas, kiam oni malleviĝas. Oni kredas sin tre proksima ; oni estas tre malproksima.

Kaj frato Felikso sin malkaŝas por montri, ke li estas prava. La paseroj, timigite, denove forflugas.

Sed restas unu, ekstreme de branĉo, kiu fleksigas kaj ĝin balancas. Ĝi skuas la voston, movas la kapon, prezentas sian bruston.

KAROTHARULO

Vere, tiun ĉi mi povas pafi: pri ĝi mi estas certa.

GRANDA FRATO FELIKSO

Deflankigu, ke mi vidu. Jes, efektive, estas al vi facile. Rapidu, donu al mi la karabenon.

Kaj jam, Karotharulo, kun manoj malplenaj, senarma, oscedas: anstataŭ li, antaŭ li, granda frato Felikso almetas al la ŝultro la karabenon, celas, pafas, kaj la pasero falas.

Tio estas kvazaŭ ĵonglaĵo. Karotharulo antaŭ momento premadis la karabenon al sia koro. Subite, li ĝin perdis, kaj nun li ĝin retrovas, ĉar granda frato Felikso ĵus redonis ĝin al li, kaj poste, servante kiel hundo, kuras preni la paseron, kaj diras:

— Vi tro prokrastis; vi devis iom rapidi.

KAROTHARULO

Iom multe.

GRANDA FRATO FELIKSO

He? Ĉu vi koleretas?

KAROTHARULO

Nu! Ĉu vi volas, ke mi kantu?

GRANDA FRATO FELIKSO

Sed, ĉar ni havas la paseron, pri kio vi plendas? Imagu, ke ni povis ĝin maltrafi.

KAROTHARULO

Oh! mi!

GRANDA FRATO FELIKSO

Ĉu vi, ĉu mi, estas same. Mi pafis ĝin hodiaŭ,
vi pafos morgaŭ.

KAROTHARULO

Nu ! morgaŭ.

GRANDA FRATO FELIKSO

Mi promesas.

KAROTHARULO

Mi scias : vi promesas ... la antaŭtagon.

GRANDA FRATO FELIKSO

Mi ĵuras ; ĉu vi estas kontenta ?

KAROTHARULO

Bone !... Sed, se ni tuj serĉus alian paseron,
mi provus la karabenon.

GRANDA FRATO FELIKSO

Ne, estas tro malfrue. Ni reiru hejmen, por ke
panjo kuiru tiun ĉi. Mi ĝin donas al vi. Metu ĝin
en vian poŝon, kaj lasu vidi la bekon.

La du ĉasistoj reiras hejmen. Kelkfoje ili
renkontas kamparanon, kiu salutas kaj diras :

— Knaboj, espereble vi ne pafis la patron ?

Karotharulo, flatate, forgesas sian malkontent-
econ. Ili alvenas, repaciĝinte, triumfantaj, kaj
S-ro Lepic, tuj kiam li ekvidas ilin, miras :

Kiel ! Karotharulo, ankoraŭ vi portas la kara-
benon ! vi do ĝin portis la tutan tempon ?

— Preskaŭ, diras Karotharulo.

La medikago ⁽¹⁾

Karotharulo kaj frato Felikso revenas el la preĝejo kaj rapidas hejmen, ĉar estas la horo por la posttagmeza manĝeto.

Frato Felikso havos panon kun butero aŭ konfitaĵo, kaj Karotharulo panon kun nenio, tial ke li volis ŝajni viro tro frue, kaj proklamis, antaŭ atestantoj, ke li ne estas frandema. Li amas la aferojn en la natura stato, manĝas kutime nur simplan panon kun afekteco, kaj tiun ĉi vesperon ankoraŭ, marŝas pli rapide, ol frato Felikso, por havi unue sian porcion.

Iafoje la simpla pano ŝajnas malmola. Tiam Karotharulo sin ĵetas sur ĝin, kiel oni atakas malamikon, ĝin kaptas, al ĝi donas dentpremojn, kapbatojn, ĝin mordetas, ĝin dispecigas. Ĉirkaŭ li, lia familio lin rigardas kun miro.

Lia stomako de struto digestus ŝtonojn, malnovan verdigran soldon.

Resume, tre facile estas lin nutri.

Li premas la riglilon de la pordo. Ĝi estas fermita.

— Mi kredas, ke niaj gepatroj estas for. Frapu vi.

Frato Felikso, ĵurante la nomon de Dio sin ĵetas al la peza najloplena pordo kaj longatempe ĝin sonigas. Poste, ambaŭ, unuigante sian penadon, kontuzas al si vane la ŝultrojn.

(1) Nomo de herbo: lat. medicago; fr. luzerne; ang. lucern; germ. Lucerne; it. medica; hisp. alfalfa.

KAROTHARULO

Certe, ili estas for.

GRANDA FRATO FELIKSO

Sed kie ili estas ?

KAROTHARULO

Oni ne povas scii ĉion. Ni sidiĝu.

Sidantaj sur la malvarmaj ŝtupoj, ili sentas nekutiman malsaton. Per oscedoj, per pugnaj batoj al sia brusto, ili esprimas ĝian plenan forton

GRANDA FRATO FELIKSO

Se ili kredas, ke mi ilin atendos !

KAROTHARULO

Tamen, tio estas la plej bona.

GRANDA FRATO FELIKSO

Ilin mi ne atendos. Mi ne volas morti de malsato, mi. Mi volas tuj manĝi, ion ajn, herbon.

KAROTHARULO

Herbon, jen estas ideo, kaj niaj gepatroj miros.

GRANDA FRATO FELIKSO

Vere, oni manĝas salaton. Nu, medikago, ekzemple, estas tiel mola, kiel salato. Ĝi estas salato sen oleo kaj sen vinagro.

KAROTHARULO

Oni ne bezonas ĝin pretigi.

GRANDA FRATO FELIKSO

Ĉu vi volas veti, ke mi manĝos medikagon, mi, kaj ke vi ne manĝos ?

KAROTHARULO

Kial vi, kaj ne mi ?

GRANDA FRATO FELIKSO

Senŝerce, ĉu vi volas veti ?

KAROTHARULO

Sed, ni povus eble peti de la najbaroj ĉiu po unu tranĉaĵo da pano, kune kun kazeaĵo por surŝmiri ?

GRANDA FRATO FELIKSO

Mi preferas medikagon.

KAROTHARULO

Ni iru !

Baldaŭ la medikaga kampo elmontras antaŭ iliaj okuloj sian apetitan verdaĵon. Apenaŭ enirinte, ili ĝojas treni la ŝuojn, premegi la molajn trunketojn, desegni mallarĝajn vojetojn, kiuj maltrankviligos longatempe, kaj pri kiuj oni diros :

— Kia besto tie ĉi pasis ?

Tra iliaj pantalonoj malvarmeto eniras ĝis la kruroj iom post iom rigidiĝantaj.

Ili haltas meze de la kampo kaj sin lasas fali sur la ventro.

— Oni kuŝas agrable, diras frato Felikso.

Tiklataj je l' vizaĝo, ili ridas kiel iam, kiam ili kuŝis kune en la sama lito, kaj S-ro Lepic al ili kriis el la najbara ĉambro :

— Ĉu vi baldaŭ ekdormos, vi abomenaj buboj ?

Ili forgesas la malsaton kaj komencas naĝi mariste, hunde, rane. Nur la du kapoj elstaras. Ili tranĉas per la manoj, repuŝas per la piedoj la

verdajn ondetojn facile disrompeblajn. Rompите, ili ne plu reformiĝas.

— Mi havas da ili ĝis la mentono, diras frato Felikso.

— Rigardu, kiom mi antaŭeniras.

Ili devas halti, ĝuadi pli kviete sian feliĉon.

Kubutapogante, ili observas la kavajn galeriojn, kiujn fosas talpoj, kaj kiuj zigzagas je la tera supraĵo, kiel je la haŭta supraĵo vejnoj de maljunuloj. Jen la galerioj malaperas, jen ili finiĝas en ia maldensejo, kie la manĝema kuskuto, malbona parazito, ĥolero de la bonaj medikagejoj sternas sian barbon de flavruĝaj fadenetoj. La talpejoj tie faras malgrandan vilaĝeton da terdometoj starantaj laŭ la Indana modo.

— Nenio malhelpas, diras frato Felikso. Ni manĝu. Mi komencas. Zorgu, ke vi ne tuŝu mian porcion.

Per la brako kiel radio, li desegnas arkon de cirklo.

— Al mi sufiĉas la restaĵo, diras Karotharulo.

La ambaŭ kapoj malaperas. Kiu ilin divenus ?

La vento blovas dolĉajn spiraĵojn, turnas la maldikajn folietojn de medikago, vidigas la palan subaĵon, kaj tra la tuta kampo kuras tremetoj.

Frato Felikso per plenaj brakoj elŝiras furaĝon, envolvas per ĝi sian kapon, ŝajne ĝin manĝegas, imitas la bruon de la makzeloj de nesperta bovido, kiu sin ŝveligas. Kaj dum li ŝajne manĝegas ĉion, eĉ la radikojn, ĉar li konas la vivon, Karotharulo efektive manĝas kaj elektas delikate nur la belajn foliojn.

Per la pinto de sia nazo, li ilin mallevas, kondukas al sia buŝo kaj serioze maĉas.

Kial li rapidus? La tablo ne estas luita.

Kaj, kun grincantaj dentoj, kun lango maldolĉa, kun naŭza koro, li englutas, li sin regalas.

La trumpeto.

S-ro Lepic ĵus matene reveturis el Parizo. Li malfermas sian keston. Donacoj el ĝi eliras por granda frato Felikso kaj fratino Ernestino, belaj donacoj, pri kiuj ĝuste (kiel strange okazas!) ili songis la tutan nokton. Poste, S-ro Lepic, metante la manojn post sian dorson, malice rigardas Karotharulon kaj al li diras:

— Kaj vi, kion vi pli amas: trumpeton aŭ pistolon?

Efektive, Karotharulo estas pli vere singardema, ol kuraĝega. Li preferus trumpeton, ĉar « tio ne eksplodas al vi en la manoj », sed li ĉiam aŭdis, ke tia granda knabo, kia li estas, povas dece ludi nur kun armiloj, glavoj, bataliloj. La aĝo al li venis enflari pulvon, kaj dismortigi aĵojn. Lia patro konas la infanojn: li certe alportis tion, kio taŭgas.

— Mi pli amas pistolon, li diras sentime, certa, ke li divenis.

Eĉ li iom trodiras kaj aldonas:

— Neniom jam helpas ĝin kaŝi; mi ĝin vidas!

— Ah! diras S-ro Lepic, embarasita, vi pli amas pistolon! Vi do multe ŝanĝigis?

Tuj Karotharulo ŝanĝas:

— Nu, ne, paĉjo ; mi nur ŝercis. Trankviliĝu, pistolojn mi malamegas. Tuj donu al mi mian trumpeton, ke mi al vi montru, kiom mi amuziĝas, blovante en ĝin.

SINJORINO LEPIC

Kial do vi mensogas ? por ĉagreni vian patron, ĉu ne vere ? Kiam oni amas trumpetojn, oni ne diras, ke pistolojn oni amas, kaj precipe oni ne diras, ke oni vidas pistolon, kiam oni nenion vidas. Tial, rekompence, vi ricevos nek trumpeton nek pistolon. Rigardu ĝin bone : ĝi havas tri ruĝajn glanojn kaj flageton kun oraj franĝoj. Vi sufiĉe ĝin rigardis. Nun, iru en la kuirejon kaj enrigardu, ĉu mi tie sidas ; foriru, trotu kaj blovu tra viaj fingroj.

Plej alte en la ŝranko, sur amaso da blanka tolaĵo, enrulita en la tri ruĝaj glanoj kaj la orfranĝa flageto, la trumpeto de Karotharulo atendas en-blovonton, neatingebla, nevidebla, silenta, kiel la trumpeto de la lasta juĝado.

Agatho, la nova servistino.

Estas Agatho, nepino de Honorino, kiu ŝin anstataŭas.

Scivole Karotharulo observadas la ĵus ventintan servistinon, kiu dum kelkaj tagoj deturnos de li al si la atenton de la Lepic'aro.

— Agatho, diras S-rino Lepic, frapu antaŭ ol eniri, kio ne signifas, ke vi devas trapuŝi la pordojn per pugnaj batoj, kiel ĉevalo.

— Ĝi komenciĝas, al si diras Karotharulo, sed mi ŝin atendas ĉe la tagmanĝo.

Oni manĝas en la granda kuirejo. Agatho, kun telertuko sur la brako, staras, preta kuri de la forno al la ŝranko, de la ŝranko al la tablo, ĉar ŝi apenaŭ scias marŝi trankvile; ŝi preferas spiregi, kun vangoj sangruĝaj.

Kaj ŝi parolas tro rapide, tro laŭte, tro deziras bone fari.

S-ro Lepic sidiĝas, malfaldas sian telertukon, puŝas sian teleron al la plado, kiun li vidas antaŭ si, prenas viandon, saŭcon kaj retiras la teleron. Li verŝas al si trinkaĵon, kaj kurbigante la dorson, mallevante la okulojn, li sin nutras sobre hodiaŭ, kiel ĉiutage, indiferece.

Kiam oni ŝanĝas pladon, li kliniĝas sur sia seĝo kaj movas la femuron.

S-rino Lepic servas la infanojn: unue fraton Felikson, ĉar lia stomako krias malsaton, poste fratino Ernestinon, pro ŝia unuenaskiteco, fine Karotharulon, kiu sidas ekstreme de la tablo.

Neniam li petas duan porcion, kvazaŭ tio estus nepre malpermesita. Unu porcio devas sufiĉi. Se oni faras proponon, li akceptas, kaj ne trinkante, li plenigas sin per rizo, kiun li ne ŝatas, por flati S-rinon Lepic, kiu, sola en la familio, ĝin tre ŝatas.

Pli sendependaj, se frato Felikso kaj fratino Ernestino deziras duan porcion, ili puŝas, laŭ la manerio de S-ro Lepic, sian teleron al la plado.

Sed neniu parolas.

— Kio do al ili estas? al si diras Agatho.

Al ili estas nenio. Ili estas tiaj, simple.

Ŝi ne povas sin deteni de oscedado, disetendante la brakojn, antaŭ unu kaj alia.

S-ro Lepic manĝas malrapide, kvazaŭ li maĉus pistitan vitron.

S-rino Lepic, kvankam pli babilema ol pigo ekster la manĝadoj, ordonas ĉe la tablo per gestoj kaj kapsignoj.

Fratino Ernestino levas la okulojn al la plafono.

Frato Felikso skulptas sian panmolaĵon, kaj Karotharulo, kiu ne plu havas glason, zorgas nur, ke li ne malplenigu sian teleron tro frue, pro la manĝa plezuro, aŭ tro malfrue, pro malrapidemo. Por tio, li faras komplikajn kalkulojn.

Subite S-ro Lepic iras plenigi per akvo karafon.

— Mi ja povus iri, diras Agatho.

Aŭ pli vere, tion ŝi ne diras, ŝi nur pensas ĝin. Jam trafite de la komuna malsano, ŝi sentas al si peza la langon, ŝi timas paroli, sed kredante sin kulpa, ŝi duobligas sian atenton.

S-ro Lepic preskaŭ ne plu havas panon. Tiun ĉi fojon, Agatho ne lasos lin servi sin mem. Ŝi observadas lin tiel, ke ŝi forgesas la aliajn, kaj ke S-rino Lepic, krude, per :

— Agatho, ĉu al vi kreskas branĉo? — revokas ŝin al la realeco.

— Jen, sinjorino ! respondas Agatho.

Kaj ŝi fervoras, ne ĉesante observi S-ron Lepic. Ŝi volas lin favorigi per sia servemo, kaj ŝi penas fari ion rimarkindan.

Estas ĝustatempe.

En la momento, kiam S-ro Lepic ekmordas sian lastan panpecon, ŝi kuras al la ŝranko, kaj alportas freŝan kvinfontan pankronon, kiun ŝi bon-

kore prezentas, tute feliĉa, ke ŝi divenis la deziron de l'mastro.

Sed S-ro Lepic faldas sian telertukon, stariĝas, surmetas sian ĉapelon, kaj iras en la ĝardenon, por fumi cigaredon.

Kiam li finis mangadon, li ne rekomencas.

Kvazaŭ najlita al la planko, ne komprenante, Agatho, tenante sur sia ventro la kvinfontan pankronon, ŝajnas vaksa reklamilo por fabriko de maraj saviloj.

La unua tago de la jaro.

Neĝas. Por ke novjartago bone sukcesu, necese estas, ke neĝu.

S-rino Lepic, prudente, lasis riglita la pordon de la korto. Jam buboj skuas la riglilon, batas malsupre la pordon, unue diskrete, poste malamike, per siaj lignaj ŝuoj, kaj laciĝinte esperi, malproksimiĝas, sin returnante, rigardante al la fenestro, kie S-rino Lepic ilin spionas. La bruo de iliaj paŝoj mallaŭtiĝas en la neĝo.

Karotharulo saltas el la lito, iras sin lavi, sen sapo, en la trogo de l'ĝardeno. Ĝi estas glaciigita. Li devas rompi la glacieron, kaj tiu ĉi unua ekzerciĝado disverŝas tra lia tuta korpo varmon pli sanigan, ol tiu de la fornoj. Sed li ŝajnigas, ke li akvumas sian vizaĝon, kaj, ĉar oni trovas lin ĉiam malpura, eĉ kiam li zorge sin purigis, li forigas nur la plej videblan malpuraĵon.

Vigla kaj freŝa por la ceremonio, li metas sin post sian pli aĝan fraton, kiu staras post fratino

Ernestino, la unuenaskita. Ĉiuj tri eniras en la kuirejon. Gesinjoroj Lepic tien kunvenis, kvazaŭ okaze.

Fratino Ernestino ilin kisas kaj diras :

— Bonan tagon, paĉjo, bonan tagon, panjo, mi deziras al vi bonan jaron, bonan farton, kaj la paradizon je la fino de viaj tagoj.

Frato Felikso diras la samon, tre rapide, kurante al la fino de la frazo, kaj simile kisas.

Sed Karotharulo prenas el sia ĉapeto leteron. Oni legas sur la fermita koverto : « Al miaj karaj gepatroj ». Sur ĝi ne estas adreso. Birdo de malofta speco, riĉe kolorigita, en angulo flugas kun etenditajflugiloj.

Karotharulo ĝin prezentas al S-rino Lepic, kiu ĝin dissigelas. Maturaj floroj ornamas sufiĉege la paperon, kaj punto ĝin ĉirkaŭas, en kies truojn ofte falis la plumo de Karotharulo, ŝprucigante inkon sur la najbaran vorton.

SINJORO LEPIC

Kaj mi ? mi nenion ricevas !

KAROTHARULO

Por ambaŭ ĝi estas ; panjo pruntedonos ĝin al vi.

SINJORO LEPIC

Do, vian patrinon vi amas pli, ol min. Nu, serĉu, ĉu tiu ĉi nova deksolda monero estas en via poŝo.

KAROTHARULO

Iom paciencu ; panjo tuj finos.

SINJORINO LEPIC

Vi havas stilon, sed tiel malbonan skribon, ke mi ne povas legi.

— Jen, paĉjo, diras Karotharulo afable, via-vice nun.

Dum Karotharulo rekte starante, atendas respondon, S-ro Lopic legas la leteron unu fojon, du fojojn, ĝin ekzamenas longatempe laŭ sia kutimo, diras « Ah ! ah ! » kaj metas ĝin sur la tablon.

Ĝi ne plu utilas, farinte sian tutan efekton. Ĝi apartenas al ĉiuj. Ĉiu povas vidi, tuŝi ĝin. Frato Felikso kaj fratino Ernestino siavice ĝin prenas kaj serĉas en ĝi ortografiajn erarojn. Tie ĉi Karotharulo kredeble ŝanĝis sian plumon : estas pli legeble. Poste ili redonas ĝin al li.

Li turnas ĝin kaj returnas, malbele ridetas, kaj ŝajnas demandi : kiu ĝin volas ?

Fine, li remetas ĝin en sian ĉapeton.

Oni disdonas la novjarajn donacojn. Fratino Ernestino ricevas pupon tiel grandan, kiel ŝi, eĉ pli grandan, kaj frato Felikso skatolon da plumbaj soldatoj tuj batalontaj.

— Mi rezervis al vi surprizon, diras S-rino Lopic al Karotharulo.

KAROTHARULO

Ah, jes !

SINJORINO LEPIC

Kial tiu ĉi : Ah, jes ? Ĉar vi ĝin konas, senutile estas, ke mi ĝin montru.

KAROTHARULO

Mi neniam vidu Dion, se mi ĝin konas.

Li levas supren la manon, serioza, certa pri si mem. S-rino Lepic malfermas la telermebalon. Karotharulo spiregas. Ŝi enpuŝas sian brakon ĝis la ŝultro, kaj malrapide, mistere, eltiras sur flava papero pipon el ruĝa sukero.

Karotharulo, senŝanceliĝe, radias de ĝojo. Li scias, kion li devas fari. Tuj li volas fumi antaŭ la gepatroj, sub la ĵaluza rigardo (sed oni ne povas ĉion havi!) de frato Felikso kaj de fratino Ernestino. Tenante la pipon el ruĝa sukero nur per du fingroj, li streĉiĝas, klinas la kapon maldekstren. Li rondigas la buŝon, kavigas la vangojn, kaj enspiras forte kaj brue.

Poste, kiam li ĵetis ĝis la ĉielo dikegan blovaĵon :
— Ĝi estas bona, li diras, ĝi bone suĉiĝas.

Iro kaj reveno.

Geknaboj Lepic alvenas por libertempo. Apenaŭ saltinte el la veturilo, kaj el la plej malproksime, de kie li ekvidas siajn gepatrojn, Karotharulo sin demandas :

— Ĉu estas ĝustatempe kuri antaŭen al ili ?

Li ŝanceliĝas ;

— Estas tro frue, mi perdus la spiradon ; kaj, plie, oni devas nenion trograndigi...

Li prokrastas ankoraŭ :

— Mi kuros de tie,... ne, de tie.

Li faras al si demandojn :

— Kiam mi devos levi mian ĉapeton ? kiun el ambaŭ mi kisos unue ?

Sed frato Felikso kaj fratino Ernestino antaŭkuris kaj jam dividas inter si la familiajn karesojn. Kiam Karotharulo alvenas, neniom restas da ili.

— Kial, diras S-rino Lepic, vi nomas ankoraŭ S-ron Lepic « paĉjo », vi, tiom aĝa ? Nomu lin « mia patro » kaj donu al li manpremon : tio estas pli vira.

Poste, ŝi kisas lin unufoje, sur la frunto, por ne kaŭzi ĵaluzecon.

Karotharulo estas tiel kontenta esti en libertempo, ke li ploras. Kaj ofte okazas tiel ; ofte li montras siajn sentojn malĝuste.

Je la tago de l'reiro en la lernejon, el la plej malproksime, de kie ŝi aŭdas la tintilojn de la veturilo, S-rino Lepic sin ĵetas al siaj infanoj kaj ilin samtempe ĉirkaŭprenas. Karotharulo ne troviĝas en la ĉirkaŭpreno. Li esperas pacience sian vicon, tuj ekprenonte la rimenojn por supreniri la imperialon, kun la adiaŭoj jam pretaj, tiel malĝoja, ke li nevole kantetas.

— Ĝis revido, mia patrino, li diras serioze.

— Nu ! diras S-rino Lepic, por kiu vi prenas vin, bubeto ? Ĉu al vi multe kostus min nomi « panjo », kiel ĉiuj ? Ĉu oni jam vidis ion tian ? Li estas ankoraŭ blanka je la beko kaj malpura je la nazo, kaj volas fari originalaĵojn !

Tamen, ŝi kisas lin unufoje sur la frunto, por ne kaŭzi ĵaluzecon.

La kato.

I.

Karotharulo pri tio ĉi aŭdis: nenio tiel bone taŭgas, kiel kata viando, por kapti kankrojn, nek kokida internaĵo, nek forĵetaĵoj de buĉejo.

Nu, li konas katon, malŝatatan, ĉar ĝi estas maljuna, malsana, kaj senhara tie kaj tie. Karotharulo invitas ĝin, ke ĝi venu trinki tason da lakto ĉe li, sub lia tegmenteto. Ili estos solaj. Eble ankaŭ rato elŝteliĝos el la muro, sed Karotharulo promesas nur tason da lakto. Li metis ĝin en angulon. Tien li puŝas la katon, kaj diras:

— Vi regalu vin.

Li karesas al ĝi la dorson, donas al ĝi amikajn nomojn, observas la viglajn movojn de ĝia lango, kaj kortuŝiĝas:

— Malfeliĉa maljunulo! ĝuadu, kion al vi restas.

La kato malplenigas la tason, purigas la fundon, viŝas la randon, kaj nenion jam lekas, krom ĝiaj sukeritaj lipoj.

— Ĉu vi finis, tute finis? demandas Karotharulo, kiu ĝin ankoraŭ karesas. Sendube, vi volonte trinkus alian tason; sed mi povis ŝteli nur tiun ĉi. Cetere, iom pli frue, iom pli malfue!...

Tion dirinte, li almetas al ĝia frunto la tubon de sia karabeno kaj pafas.

La pafbruo donas kapturon al Karotharulo. Li kredas, ke la tegmento mem eksplodis, kaj kiam la nuboj malaperas, li vidas, antaŭ siaj piedoj, la katon, kiu lin rigardas per unu okulo.

Duono de la kapo estas frakasita, kaj la sango fluas en la tason de lakto.

— Ĝi ne ŝajnas mortigita, diras Karotharulo. Strange! Mi ja tamen celis ĝuste.

Li timas moviĝi, tiom maltrankviligas lin la unika okulo, flavbrila.

La kato, per tremeto de sia korpo, montras, ke ĝi vivas, sed ĝi neniel provas moviĝi. Ĝi ŝajnas sangadi intence en la tason, zorgante, ke ĉiuj gutoj falu en ĝin.

Karotharulo ne estas komenculo. Li mortigis sovaĝajn birdojn, hejmajn bestojn, hundon, ĉu por sia propra plezuro, ĉu laŭ peto de aliuloj. Li scias, kiel oni faras, kaj ke, se la besto estas malfacile mortigebla, oni devas rapidi, ekscitiĝi, koleriĝi, eĉ riski senperan batalon kun ĝi. Alie, movoj de neĝustatempa sentemo nin kaptas. Oni fariĝas senkuraĝa. Oni perdas tempon. Oni finas neniam.

Unue, li provas kelkajn singardajn incitetojn. Poste, li ekkaptas la katon per la vosto, kaj frapas sur ĝian nukon per sia karabeno batojn tiel fortegajn, ke ĉiu el ili ŝajnas la lasta, la fina bato.

En senordaj movoj la kato ungoskrapas tra l'aero, kuntiriĝas kiel bulo, aŭ malstreĉiĝas, sed ne krias.

— Kiu do certigis al mi, ke la katoj ploras, kiam ili mortas? diras Karotharulo.

Li senpacienciĝas. Tio estas tro daŭra. Li forĵetas sian karabenon, ĉirkaŭprenas la katon per siaj brakoj, kaj, ekscitata de la penetrado de la ungoj, kunpremante la dentojn, ŝveligante la vejnojn, li sufokas ĝin.

Sed li ankaŭ sufokiĝas, ŝanceliĝas, senforta, kaj falas teren, sidigante, kun sia vizaĝo kontraŭ la vizaĝo kaj siaj du okuloj kontraŭ la okulo de l'kato.

II.

Karotharulo nun kuŝas sur sia fera lito.

La gepatroj kaj la amikoj de la gepatroj urĝe alvokitaj, vizitas, kurbigante sub la malalta tegmenteto, la lokon, kie plenumiĝis la dramo.

— Ah! diras lia patrino, mi devis centobligi miajn fortojn por eltiri la katon premitan sur lia koro. Mi certigas, min li ne tiel premas.

Kaj dum ŝi rakontas pri la signoj de kruel-egeco, kiu poste, dum la familiaj vesperkunvenoj, ŝajnos legenda, Karotharulo dormas kaj songas:

Li promenas apud rivereto, kie la radioj de neevitebla luno moviĝas, interkruciĝas, kiel la trikiloj de trikistino.

Sur kaptiletoj, pecoj de kata viando brilas tra la akvo travidebla.

Blankaj nebuletoj glitas, ŝoviĝante sur la herbejo, kaŝas eble malpezajn fantomojn.

Karotharulo, kun la manoj post la dorso, pruv-
as al ili, ke ili nenion timu.

Bovo proksimiĝas, haltas kaj blovas, forkuras poste, sendas ĝis la ĉielo la bruon de siaj kvar hufoj kaj malaperas.

Kia kvieteco, se la babilema rivereto ne tiom babilus, paroletus, incitetus, ĝi sola, kiom aro da maljunulinoj.

Karotharulo, kvazaŭ li volus ĝin frapi por ĝin silentigi, levas malrapide fiŝkaptilan bastoneton, kaj jen el la mezo de la kanoj supreniras gigantaj kankroj.

Ili ankoraŭ pligrandiĝas, kaj eliras el la akvo, rektaj, brilaj.

Karotharulo, plipeza pro teruro, ne scias forkuri.

Kaj la kankroj lin ĉirkaŭas.

Ili altiĝas ĝis lia gorĝo.

Ili kraketas.

Jam ili malfermas siajn prenilojn, plej larĝe....

J. RENARD.

Trad. H. MUFFANG